



同語

Mikrofone

6-a jaro • Januaro-marto, 2008

- Novjaraj salutoj kaj bondeziroj el diversaj mondpartoj
- Mirinda Somera Palaco
- Ekbrulis olimpika torĉo en Olimpio
- Ĝeneralaj impresoj pri 5-jara Mikrofone





Enkonduko

Per tiu ĉi numero ni paŝis en la jaron 2008, kiu eventuale estos ne ordinara jaro por Ĉinio, pro la monde atentataj Pekinaj Olimpikoj kaj pro aliaj aferoj. Ankaŭ Mikrofone eniris sian 6-an jaron! Mi kore dankas vin, niaj karaj legantoj, pro via pacienca kaj entuziasma akompano dum la pasintaj 5 jaroj.

Ĉu vi rimarkis ŝanĝeton sur la kovrilo de nia ĉi-foja numero? Vi pravas! La du ĉinaj ideogramoj 话筒 – ĉinlingva traduko de Mikrofone – iom diferencas de tiuj en la antaŭaj numeroj. En la komenco de la kuranta jaro ni petis s-ron Wang Gengnian, direktoron de Ĉina Radio Internacia, fari novan epigrafon por nia Mikrofone kaj li afable kontentigis nian deziron. (La antaŭan epigrafon faris s-ro Li Dan, eksa direktoro de Ĉina Radio Internacia.)

Kiel kutime, antaŭ la alveno de la nova jaro 2008, ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao adresis novjaran mesaĝon al la tutlanda popolo de ĉiuj naciecoj, al samlandanoj en Hongkong, Aomen kaj Taiwan, al transmaraj ĉindevenuloj kaj elmigrintaj ĉinoj, kaj ankaŭ al diverslandaj popoloj de la tuta mondo. Ankaŭ s-ro Wang Gengnian, direktoro de Ĉina Radio Internacia, faris novjaran salutparolon al niaj aŭskultantoj. Krom tiuj du novjaraj salutoj, en tiu ĉi numero vi legos ankaŭ informojn pri la ekbruligo de la olimpika torĉo okazinta antaŭ la ruino de la templo Hera en Olimpio de Grekio, pri la batalo kontraŭ la katastrofo de pluvneĝo kaj frosto en la suda parto de Ĉinio, kaj tiel plu.

De tiu ĉi numero ni havas novan rubrikon, per kiu ni prezentas al vi la plej rimarkindajn intervjuojn faritajn de nia redakcio al famaj esperantistoj ĉinaj kaj alilandaj. Ĉi-foje ni elektis intervjuon al s-ro Wang Minhao, prezidanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Li parolis pri sia kariero kiel esperantisto kaj pri siaj amikaj kontaktoj kun alilandaj esperantistoj.

En aŭgusto inaŭguriĝos la 29-aj Someraj Olimpikoj en Pekino. Ni esperas, ke vi venu al Pekino por persone sperti la olimpikan etoson!

Kun varmaj brakumoj,

Jianping Zhao

Anonco pri Fotokonkurso

Karaj legantoj! Kvinjariĝis nia Mikrofone. En la pasintaj 5 jaroj, dank' al via plenforta subteno kaj aktiva partopreno en redaktado, Mikrofone fariĝis pli kaj pli enhavoriĉa, leginda kaj ŝatata. En la longa kunlaborado ni rimarkis, ke multaj el vi estas spertaj ne nur en redaktado, sed ankaŭ en fotado. Por eltrovi kaj prezenti vian fotografian talenton, ni decidis okazigi fotokonkurson de la 1-a

de majo ĝis la 1-a de oktobro ĉi-jare. Ni atendas vian aktivan partoprenon.

En la konkurso rajtas partopreni ankaŭ viaj familianoj, parencoj kaj amikoj. La fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, kiuj temu pri floroj, birdoj, pejzaĝoj, kaj personoj, kaj spegulu kutimon kaj moron de vialanda popolo, emociigajn momentojn historian kaj nuntempan, aŭ

gravan eventon pri nia E-Movado kaj aliaj. Bonvole skribu titolon aŭ mallongan klarigon pri viaj fotoj.

Bonajn fotojn ni regule publikigos en Mikrofone kaj nia retpaĝo.

Post la 1-a de oktobro ni elektos bonajn fotojn por la premioj unua, dua kaj tria. Antaŭgratulon al sukcesontoj kaj koran dankon al ĉiuj partoprenontoj!

Novjara mesaĝo de ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao



Sinjorinoj, sinjoroj, kamaradoj, amikoj:

Baldaŭ sonos la novjara sonorilo kaj alvenos la jaro 2008. En ĉi tiu bela momento, plena de esperoj, mi tre ĝojas adresi, pere de Ĉina Radio Internacia, Ĉina Nacia Radio kaj Ĉina Centra Televid-stacio, novjaran bondeziron al la tutlanda popolo de ĉiuj naciecoj, al samlandanoj en Hongkong-a Speciala Administra Regiono, Aomen-a Speciala Administra Regiono kaj Taiwan, al transmaraj ĉindevenuloj kaj ĉinaj elmigrintoj kaj al diversalantaj amikoj tra la tuta mondo!

En la jaro 2007, nova ŝanĝiĝo okazis en la mondo kaj Ĉinio gajnis novan progreson. La ĉina popolo de ĉiuj naciecoj unuanime antaŭenpuŝis plu la procezon de ĉiufanka konstruado de bonhaveca socio. Pluapaŝe grandiĝis la sinteza ŝtata forto de Ĉinio kaj pliboniĝis la popola vivo. La ĉina popolo plifortigis interfluojn kaj kunlaborojn kun diversalantaj popoloj, aktive klopodis por bone solvi varmajn internaciajn problemojn kaj vigle akcelis konstruadon de harmonia mondo kun longedaŭra paco kaj komuna prospero. Antaŭ 2 monatoj okazis la 17-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio. La kongreso desegnis grandiozan planon pri tio, ke en la novepoka kondiĉo ni ĉiufanke konstruu plu bonhavecan socion kaj rapidigu la socialisman modernigon. Nun la ĉina popolo kondukas, per siaj diligento kaj saĝo, novan luktadon

por skribi novan ĉapitron pri bela vivo.

La jaro 2008 estas tre grava por la ĉina popolo. Ni solene celebros la 30-jariĝon de la reformado kaj malfermo. En 1978 la reformado kaj malfermo komenciĝis kiel ŝlosileca elekto, decida al la nuna sorto de Ĉinio, kaj jam portis historian ŝanĝiĝon al la fizionomio de la socialisma Ĉinio. Ni alte tenos plu, kun firmeco kaj neŝancebleco, la grandan standardon de socialismo kun ĉinaj trajtoj, profunde efektivigos kaj praktikos sciencan disvolvan koncepton, liberigos plu la penson, persistos en la reformado kaj malfermo kaj disvolvos la socialisman merkatan ekonomion, socialisman demokratian politikon kaj socialisman avangardan kulturon. Ni plifortigos socian konstruadon kun plibonigo de la popola vivo kiel ĉefaĵo, akcelos socian harmonion kaj klopodos por tio, ke iu ajn el la tuta popolo povu aŭ viziti lernejon, aŭ ĝui gajnon el laboro, aŭ ricevi kuracadon dum malsano, aŭ esti viv-subtenata en maljuneco, kaj ĉiu havu loĝejon. Ni persistos en la orientiloj pri "unu lando kun du socisistemoj", "hongkong-ana administrado de Hongkong", "aomen-ana administrado de Aomen" kaj alta aŭtonomeco kaj protektos, kune kun la vastaj amasoj de hongkong-aj kaj aomen-aj samlandanoj, la longedaŭrajn prosperon kaj stabilecon de Hongkong kaj Aomen. Ni persistos en la fundamenta orientilo pri "paca reunuigo kaj unu lando kun du socisistemoj", firme tenos la ĉeftemon pri paco kaj evoluo de la dubordaj rilatoj, ĉiam senŝanceliĝe strebos por feliĉo de ambaŭbordaj popolanoj kaj paco en Taiwan-markola regiono kaj firme defendos la ŝtatan suverenecon kaj teritorian integrecon.

En la nuna tempo, ĝenerale stabilas la internacia situacio, sed, samtempe, seriozas la neekvilibro de la tutgloba ekonomio kaj pli komplikas la internacia sekureco, tial la homaro vizaĝas ankoraŭ al multe da malfaciloj kaj defioj. Estas ja komuna deziro de diversalantaj popoloj kunĝui disvolvajn ŝancojn, kune trakti ĉiajn defiojn kaj akceli la noblan aferon de la homaro pri paco kaj evoluo. Profite de tiu ĉi okazo, mi volentas reaserti, ke Ĉinio alte tenos la standardon

Novjara mesaĝo de ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao

de paco, evoluo kaj kunlaboro, senŝanceliĝe iros sur la vojo de paca disvolvo, ĉiam senhezite praktikos malferman strategion pri reciproka utilo kaj kuna gajno, klopodos plu por antaŭenpuŝi demokratiigon de la internaciaj rilatoj kaj tion, ke la ekonomia tutmondiĝo disvolviĝu en la direkto de ekvilibro, ĝenerala favoro kaj komuna venko. Ni akcelos interfluadon kaj reciprokajn referencadon pri la civilizacio de la homaro, gardos la tutteran hejmon, de kiu la homa ekzisto dependas, kaj protektos la pacon kaj stabilecon de la mondo.

En tiu ĉi momento ni tiom pli profunde zorgas homojn en la mondo, kiuj ankoraŭ suferas de milito, malriĉo, malsano kaj katastrofo. La ĉina popolo elkore simpatias al ili pro ilia mizero kaj volas helpi

ilin laŭ sia eblo, ke ili frue liberiĝu el la malfeliĉo. Ni sincere esperas, ke ĉiulandaj popoloj povos vivi libere, egalece, konkorde kaj feliĉe sub la sama lazuro kaj kunĝuu fruktojn de paco kaj evoluo de la homaro.

En la jaro 2008 Pekino gastigos la 29-ajn somerajn olimpikojn kaj la paralimpikojn. Kun plej granda fervoro kaj maksimuma klopodo ni faros, ke la olimpikoj kaj paralimpikoj estu solenaĵoj por pliigi reciprokajn komprenon, amikecon kaj kunlaboron de la ĉina popolo kun diversalantaj popoloj. Ni varme bonvenigas sportistojn el diversaj landoj al partopreno; ankaŭ diversalantajn amikojn al Ĉinio por spekti la du solenaĵojn.

Fine, en Pekino, mi deziras al vi feliĉon kaj sanon en la nova jaro!

Nov-jara mesaĝo de Wang Gengnian, direktoro de ĈRI



Karaj aŭskultanto-amikoj, baldaŭ eksonoros la nov-jara sonorilo por 2008. Mi, en Pekino, adresas al vi ĉiuj plej sinceran saluton kaj plej elkorajn bondezirojn! Ĝojan Nov-Jaron! Pacon, feliĉon kaj sanon!

Ĉina Radio Internacia – ĉina unika nacia radio por la tuta mondo – korkore ligiĝas kun la vastega aŭskultantaro. Ĝi strebas al antaŭenmarŝo kun la epoko kaj la mondo, porpledas objektivcon kaj realecon, aspiras novajn sciojn kaj veron kaj registras, per la kapablo kolekti informojn el la tuta mondo, la spuron de la evoluado kaj ŝanĝiĝo de la mondo.

La 6-an de decembro 2007 la Ĉina Disaŭdiga Konfuzia Instituto funkciigata de Ĉina Radio Internacia oficiale inaŭguriĝis. Ni alprenos multmedian instruadon por disvastigi la ĉinan kulturon, por ke la ĉina lingvo, dank' al radio kaj reto, proksimiĝu al la aŭskultantoj de ĈRI en diversaj anguloj de la mondo kaj fariĝu ponto kaj ligilo por ke la mondo konu Ĉinion. En la pasinta jaro ĈRI ankoraŭ

funkciigis ok eksterajn programojn, sukcesis konstrui komunan platformon de novaj medioj, bilda, teksta, sona kaj videa, funkciigis 11 eksterajn retradiojn kaj poŝtelefonajn radion kaj televidon; diversaj aferoj plue rapide progresas. Tute nova Ĉina Radio Internacia kun mult-lingvaj programoj kaj multaj medioj prezentiĝos al vi, karaj amikoj. La mondo estas tuŝebla, Ĉinio proksima. En 2007 la ĉelokaj programoj de ĈRI altiras al si multe da aŭskultantoj.

En la riĉrikolta jaro 2007 ni ricevis pli ol 2 milionojn kaj 600 milojn da eksteraj leteroj kaj retmesaĝoj. Nova rekordo!

Karaj aŭskultanto-amikoj, la nova jaro ne estos ordinara. La monde atentataj Pekinaj Olimpikoj okazos en aŭgusto 2008. Ĝuste antaŭ du monatoj, inaŭguriĝis ankaŭ nia konkurso de scioj pri 'Rendevuo en 2008 – Pekinaj Olimpikoj', por la aŭskultantoj en la tuta mondo. Ni bonvenigos tutkore la amikojn el la tuta terglobo. Ĉina antikva filozofo Konfuzio diris: "Ni ege ĝojas, ke alvenas amikoj de malproksime." Ĉina Radio Internacia kune kun vi ĉiuj atendas tiun historian momenton – la 8-an de aŭgusto 2008!

Koran dankon al vi ĉiuj!

王 庚 年

Novjaraj salutoj kaj bondeziroj el diversaj mondpartoj

Okaze de la nova jaro, venis al ni novjaraj salutoj kaj bondeziroj de niaj aŭskultantoj el diversaj lokoj de la mondo.

Nome de Pola Esperanto-Asocio, prezidantino Halina Komar sendis korajn salutojn kaj sincerajn bondezirojn pri realigo de ĉiuj ambiciaj planoj, plimultigo de la aŭskultantaro, plua diskonigo de la internacia lingvo Esperanto, bondezirojn pri sano, feliĉo, amo kaj amikeco!

En sia salut-mesaĝo, Albert Reiner el Aŭstrio skribis: “Alvenis la tempo por danko pro regula ricevo de Mikrofone kaj por sendi miajn novjarajn salutojn.

“La plej allogaj kaj interesaj eroj por mi en la nova numero de Mikrofone estas tiuj pri la 'Ĉiela Altaro' kaj pri la vizitoj de viaj redaktorinoj al la ĉi-jara UK en Jokohamo. Precipe pensante pri la ne tute senproblemaj regionaj interŝtataj rilatoj ege gravas, laŭ mi, ĉi tia senbara kontakto de homoj al homoj por pli senproblemigi ankaŭ la interpopolajn rilatojn.

“Krom tio mi ankaŭ volas sendi al vi ĉiuj miajn plej bonajn bondezirojn por la nova jaro. Kaj ankaŭ al mi mem mi deziras pli da tempo por ĝui viajn programojn.”

Daniel Dominici Filho el Brazilo esperas, ke la nova jaro 2008 estos sukcesplena kaj alportos al ni ĉiuj ĝojon, amon kaj pacon, kaj ĉio fariĝos bona en la nova jaro.

Mario Amadei el Italio skribis en sia mesaĝo: “Tutkore kaj amike mi vin salutas kaj bondeziras al vi kaj viaj familianoj plenĝojajn festo-tagojn, ĉion bonan kaj agrablan en la 2008-a jaro.”

Vjacheslav Suslov el Rusio skribis en sia novjara saluto: “Ĉe la sojlo de la nova jaro mi el la tuta koro salutas kaj gratulas vin je la bordoj de la granda rusa rivero Volgo. El la tuta animo mi deziras, ke en la jaro 2008 vin ĉiam akompanu firma sano, fortuno kaj feliĉo.”

S-ro Koji Yamada el Japanio kaj Viktor Dvorak

el Ĉeĥio respektive sendis belan murkalendaron, Antoon Afschrift el Belgio, Josefo Pasero el Brazilo, Jorma Toropainen el Finnlando, Zenon Bartocha, Urszula Mokrzycka kaj Jerzy Dryja el Pollando respektive sendis tre belajn bondezirkartojn. Novjarajn salutojn kaj bondezirojn sendis ankaŭ Abel Weiner el Argentino, Leopold Patek el Aŭstrio, Braulio Gracio Neto kaj Wolmar Campostrini el Brazilo, Angel Ivanov Maglov kaj Cveta Popova el Bulgario, Viktor Dvorak, Josef Kriz, Jiri Patera kaj Karel Laštovič el Ĉeĥio, Saliko el Finnlando, Robert Pontnau, Jean Mourier kaj Paul Humblet el Francio, Tobias Meissner kaj Rokuro Makabe el Germanio, Rafael Martinez el Hispanio, Szabadi

Tibor el



Hungario, Ali Asghar Kousari el

Irano, 市村志郎, Tomiko Ikeda kaj Takezaki Mucko el Japanio, Katrin kaj Ru Bossong el Nederlando, Georgo Kilijanski, Kazimierz Krzyzak, Aleksandra Smulkowska kaj Stanislaw Smigielski de Pollando, Manuel José Pinguinha el Portugalio, Makay Attila el Rumanio, Borisa MiliĈeviĉ kaj Branka Boškoviĉ el Serbio, Nina Daniljuk el Ukrainio kaj multaj aliaj. Koran dankon al ĉiuj gratulintoj kaj bondezirintoj, kaj ni same deziras al ili kaj ĉiuj niaj aŭskultantoj sanon, feliĉon kaj ĉion bonan en la tuta jaro 2008.

Komenciĝis konstruado de altrapida fervojo inter Pekino kaj Ŝanhajo

En februaro oficiale komenciĝis la konstruado de la unua ĉina altrapida fervojo inter Pekino kaj Ŝanhajo, kun la monde avangarda nivelo. La fervojo kun plej alta teknika enteno totale longas je 1 318 kilometroj kaj la projektita hora rapido atingos 350 kilometrojn.



Ĉinio unuanime batalis kontraŭ pluvneĝo kaj frosto celebre al la Printempa Festo

La 7-a de februaro ĉi-jare estis la unua tago de la tradicia ĉina Printempa Festo. Okaze de la festo ĉinoj havas sep feriojn por solena celebrado. Laŭ tradicio, dum la Printempa Festo ĉinoj kutime kolektiĝas kun la familianoj, nove vestitaj geknaboj petardas kaj plenkreskuloj vizitas parencojn kaj amikojn reciprokante bondezirojn. Tamen en la meza tagdeko de la lasta januaro, iuj regionoj en suda Ĉinio trafis seriozan katastrofon de pluvneĝado kaj frosto, neviditan en pli ol 50 jaroj kaj pro tio la trafikado kaj transportado de tiuj lokoj estis serioze influataj. Plejpartaj vojaĝantoj estis retenitaj survoje.



Sub la zorgado de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ŝtata Konsilantaro kaj plenforta helpo de la frataj provincoj kaj municipoj ankaŭ la popolamasoj de plagitaj lokoj gaje pasigis la feston.

Ĉina Komunista Partio fortigos konstruadon por honesteco kaj kontraŭ korupteco

Ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio Hu Jintao emfazis antaŭ nelonge, ke la Komunista Partio de Ĉinio fortigos konstruadon por honesteco kaj kontraŭ korupteco, kun la sistemo de puno kaj prevento de korupteco kiel grava punkto.



Ĉinio publikigis difinon pri limigo al uzado de plastaj sakoj


Antaŭ nelonge Ĉinio publikigis difinon pri limigo al uzado de plastaj sakoj por redukti blankan polucion. Ekde la 1-a de junio de 2008, estos malpermesate en la

tuta lando produkti, vendi kaj uzi plastajn aĉetsakojn kun la dikeco de malpli ol 0,025 milimetro, samtempe estos malpermesate al supermerkatoj, magazenoj, bazaroj kaj aliaj vendejoj senpage liveri plastajn aĉetsakojn.

Ekbrulis olimpika torĉo en Olimpio

Tagmeze de la 24-a de marto, je ĉirkaŭ 40 minutoj post la 11-a horo, laŭ la loka tempo, antaŭ la ruino de la templo Hera en Olimpio, okazis ceremonio por ekbruligo de la olimpika torĉo. La ceremonio okazis en tradicia maniero: suno prilumis konkavan spegulon kaj bruligis bastonon de fajrosemo, tenatan de fama greka aktorino Maria Nafpliotou, la plej alta sacerdotino por la ceremonio. Post prezentado la plej alta sacerdotino transdonis la fajron al fama greka sportisto Alexandros Nikolaidis, la unua stafeto de la olimpika torĉo, kaj poste komenciĝis stafetado de la olimpika torĉo.





Mirinda Somera Palaco

La Somera Palaco situas en la okcidenta antaŭurbo de Pekino. Ĝia konstruado komenciĝis en la jaro 1750. S-ro Gao Dawei, vicestro de administracio de tiu imperiestra ĝardeno, konigis, ke estante unu el la mondaj kulturaj heredaĵoj, la Somera Palaco estas eminenta verkaĵo de ĉina hortikultura arto. Li diris: "la Somera Palaco estas brila reprezentanto de la imperiestraj ĝardenoj en Pekino, ankaŭ la plej bone konservata imperiestra ĝardeno."

La Somera Palaco areo je proksimume 300 hektaroj. Krom palacaj domoj, pavilonoj, altaroj, turoj kaj similaj, en tiu ĝardeno estas ankaŭ imponaj temploj kaj idiliaj pejzaĝoj propraj de Ĉinio. Ĝi enkorpiĝas alian trajton de la ĉina arkitekturo pri la imperiestra ĝardeno, t.e. koncentri ĉiujn belajn pejzaĝojn en la ĝardeno, por manifesti la suverenan ideon, ke ĉiuj lokoj sub la ĉielo apartenas al la imperiestro.

La ĉefa pitoreskejo de la Somera Palaco konsistas el Monto Wanshou kaj la Lago Kunming. La monto Wanshou, alta je pli ol 50 metroj, laŭforme aspektas kiel vespereto, kaj la Lago Kunming kiel persiko. Laŭ la ĉina tradicia koncepto, vespereto simbolas feliĉon kaj persiko longvivecon. Laŭ historia noto, origine la ĝardenon konstruigis la imperiestro Qianlong por celebri naskiĝtagon de sia patrino. Pro tio, la ĉina tradicia kulturo pri feliĉo kaj longvivo plene reliefigas en tiu ĝardeno.

En tiu fama imperiestra ĝardeno troviĝas multaj mirindaj pejzaĝoj, ekzemple la Longa Koridoro kaj la granda teatro Deheyuan.

La Longa Koridoro, longa je 728 metroj, estas la monde plej longa koridoro kaj enlistigita en "Mondajn Guinness-Rekordojn". En la koridoro vidiĝas multe da koloraj pentraĵoj temantaj pri antikvaj tradiciaj rakontoj kaj mitoj. La serpentumanta Longa Koridoro

en-ĉenigis la vidindaĵojn de la tuta ĝardeno, pro tio la koridoro portas la alinomon: "senvoĉa ĉiĉerono de la Somera Palaco".

La saman renomon ĝuas la granda teatro Deheyuan, kiu estas la plej granda antikva teatro de Ĉinio ekzistanta ĝis nun. La teatro, alta je 21 metroj, havas tri etaĝojn. Projektisto lerte aranĝis la teatron, en kiu troviĝas ne nur elevators por dekoraj, sed ankaŭ instalaĵo por konduki akvon sur la scenejon laŭ bezono de prezentado. Brita turistino Joanna Maskell diris:

"Certe interese estas spekti aktoradon ĉi tie. En tiu ĉi teatro videblas multaj mirindaĵoj, kiuj donas profundan impreson al ni."



Ĝeneralaj impresoj pri 5-jara Mikrofone

Renato Corsetti, eks-prezidanto de UEA:

Mi daŭre legas de la komenco vian periodaĵon "Mikrofone". La lasta numero, kiun mi ricevis, tamen estis vera surprizo. Temas pri la numero de julio-septembro, 2007. Ĝi iĝis vere kompleta revuo en Esperanto el Ĉinio. Mi vere gratulas vin kaj petas vin diskonigi al ĉiuj esperantistoj tra la mondo la ekziston kaj la eblecon ricevi vian "Mikrofone".

Viktor Dvorak el Ĉeĥio:

Nova formato kaj enhavo de Mikrofone plaĉas al ni kaj mi volus proponi: Estos utile ankaŭ skribi artikolojn, emfazante, ke sen senlaca laboro, ne estos sukceso en la persona vivo kaj ankaŭ en disvastigo de Esperanto. Same, sen helpo de samideanoj ne estos prospero de la laboro de ĈRI kaj Mikrofone.

Gratulon kaj multe da sukcesoj en via estonta laboro!

Adalbert Masuhr el Germanio:

Kun granda intereso mi tralegis multajn raportojn el Ĉinio, el la tuta mondo kaj el Esperantujo. Ĝi multe helpas min pli bone kompreni vian elsendon, kiun mi laŭeble aŭskultas ĉiu-vespere.

Masatake Morisima el Japanio:

Mi admiras gazetforman Mikrofone. Kvankam mi jam fariĝis 95-jara, tamen mia maldekstra okulo ankoraŭ estas vidkapabla kaj mi ĉiam tralegas ĉiun numeron de Mikrofone.

Ntawu Hubert el Ugando:

Mikrofone, kia mirinda E-informilo, kiu informas, interesas, kunigas kaj alproksimigas la homojn tra la tuta mondo! Mi deziras al tiu informilo, kiu dum kvin jaroj jam pruvis sian efikecon, ke ĝi transpasu la landlimojn kaj fariĝu reala internacia E-komunikilo.

Longan kaj fruktodonan vivon al nia Mikrofone!

Ru kaj Katrin Bossong el Nederlando

Mi kaj mia edzino Katrin treege dankas vin pro la nova tre belkolora kaj bonenhava numero de Mikrofone, kiun ni avide tralegis.

En nia lando oni neniam raportas pri viaj sciencaj atingaĵoj kaj mirindaĵoj kiel pri la efektivigo de la Trigorĝa Hidroelektra Giganto kaj aliaj. Tamen la farota laboro estos giganta, sed certe sukcesos kun la firma volo de la granda ĉina popolo.

Jose Pardal da Silva el Brazilo:

... Mi dankas vin pro la nova numero de Mikrofone en nova formo gazeta, kiu tre plaĉas al mi kaj certe ankaŭ al la ceteraj legantoj-aŭskultantoj de ĈRI. Kvankam Mikrofone aperis nur pli ol 4 jarojn, tamen ĝi jam estas venkinta informilo kaj ĝuste pro tio mi gratulas vin.

En la nova numero min interesas ĉio, kaj artikoloj, raportoj kaj cititaj leteroj, precipe la raporto pri vizito al la Imperiestra Palaco kaj literaturaĵo - mikronovelo.

Mi povas diri, ke en la pasintaj

preskaŭ 5 jaroj, Mikrofone donis al ni, legantoj kaj samtempe aŭskultantoj, sufiĉe multe da informoj pri Ĉinio kaj pri Esperanto-Movado en Ĉinio kaj en la mondo.

Angel Ivanov Maglov el Bulgario:

En la lastaj preskaŭ 5 jaroj, regule venis al mi Mikrofone, per kiu mi multe konas Ĉinion kaj la tutan mondon. Koran dankon al la redaktoroj de Mikrofone, ŝatata de ĉiuj esperantistoj, kaj pli grandan sukceson al vi!

Henryk Zugowski el Pollando:

Mi kaj mia klubo tutkore gratulas vin pro la 5-jariĝo de Mikrofone, kiu estas tre interesa por la tutmonda esperantistaro.

Tereza Turanyi el Hungario:

Mikrofone, kiu malfermas por mi novan mondon! Mi ĉiam kun granda interesiĝo atendas la sekvantan numeron de Mikrofone.

Lars Westman el Svedio:

Kia surprizo! Tute nova Mikrofone – bela kaj moderna, en kiu oni povas legi pri la vivo de junuloj en Ĉinio.

Agim Peraj, Prezidanto de Albana Esperanto-Ligo:

Mi aŭskultas vian elsendon kaj legas Mikrofone. Mi sincere gratulas vin pro la abundaj, enhavoriĉaj informoj el diversaj kampoj. Vi jam estas ne nur voĉo de Ĉinio al la mondo, sed ankaŭ sola nia voĉo por Esperanto.

Jindřich Tomišek el Ĉeĥio:

Mi ĉiam estas tre ĝoja ricevante Mikrofone kaj mi tuj legas ĝin kaj poste ofte montras al miaj geamikoj, konatoj kaj aliaj esperantistoj, informante pri via agado kaj E-elsendoj kaj instigante al aŭskultado.

Robert Pontnau el Francio:

Mi dankas vin por la ricevo de la tre bela kaj interesa Mikrofone, kiu restas unu el la malmultaj ligiloj kun via vivo en via lando. Vere la kvalito de la revuo estas ege bona. Dankon por tiu bela donaco!

Hans-Burkhard Dietterle el Germanio:

Dankon pro la nova gazetforma magazino Mikrofone kun moderna aspekto. Ĝi estas bona suplemento de la informoj pere de la elsendoj de via Esperanta radioprogramo kaj de la nova retejo de ĈRI. Nun diversaj informoj el Ĉinio ĉiutage atingas la esperantistojn en la tuta mondo. La scioj pri Ĉinio kreskas kun spir-retena rapideco. La utilo por la Esperanto-movado estas grandega. Mi interesiĝas pri la rapida ŝanĝiĝo kaj prospero de la vivcirkonstancoj kaj la kreskanta internacia influo de Ĉinio.

Karlo Ĝelozo el Italio:

Mi volas danki vin pro la valora kaj ĉiam pli eleganta Mikrofone. Ĝi atestas viglan vivon de Esperanto en historiĉa kaj grava mondoparto.

Attila Makay el Rumanio:

En la nomo de la aŭskultantoj de nia loka grupo kaj la Esperanto-Asocio Oradea, mi dankas vin pro

la informoj radio-ondaj kaj presaj pere de "Mikrofone", kiuj riĉigas niajn konojn pri via bela lando kaj brava popolo.

Himno al la "Lotuso" - Eleonora Tonkova el Rusio

Tiun ĉi leteron (epizodon ligitan kun Ĉinio) mi skribis longe, eltirante el la muzeo de mia memoro. En la vivo iuj travivaĵoj estas neforgeseblaj kaj longe restas en la memoro. Ekz. kiam mi estis 16-jara knabino, mi gajnis la unuan premion en la konkurso pri retpilkado kaj korbopilado, okazigita de Moldavio. La premiaĵo estas paro da bronzaĵoj, kiuj kvankam ofte falis, tamen ĝis nun restas perfektaj.

Mi estis ĉiam kuraĝa junulino, ĉar mia avo militis ekde 1905 kontraŭ japanaj militaristoj kaj germanaj faŝistoj kaj la patro batalis kontraŭ japanaj agresintoj en 1945.

La unuan fojon mi turnis seriozan atenton al mia estonta edzo kun jako de sia pliaĝa frato, kiam li venis en la teatron por spektaklo. Ĝis nun mi klare memoris, ke li ĉiam portis belan ĉinan kravaton el blua silko, sur kiu flirtis fabelaj birdoj kaj floris magiaj floroj.

Poste mi eksciis, ke la onklo

de mia edzo Gordeev Sergej Nikolaeviĉ laboris kiel inĝeniero en Pekino dum la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento kaj lia edzino Lidia Jvanovna rememoris, ke tiutempe ŝi ofte kantis en la ambasadaĵ akceptoj kaj ĉiuj admiris ŝian kantadon.

En la loĝejo de la maljunaj geonkloj de mia edzo: Lakitaj skatoloj, manĝilaro kaj multaj aliaj memorobjektoj. Mi uzas ĉion laŭplaĉe en mia ĉiu-taga vivo. Sed aparte mi ŝatas la pli ol 50-jaran ĉinan termoson kun desegno de lotusfloroj. Mi uzas ĝin por infuzi teon, kiam mi vojaĝas al mia eksterurba parcelo aŭ faras unutagan ekskurson al la antaŭurbo de Moskvo. Mi admiras, ke la "lotuso" longtempe tenis akvon je alta temperaturo.

Iufoje en profunda aŭtuno, la vetero jam estis sufiĉe malvarma, eĉ frostiga. Atinginte mian parcelon, mi rapide alkroĉis la "lotuson" sur iu branĉeto. Bedaŭrinde la seka branĉeto rompiĝis kaj la termosoj eksplodis. Vi ne povas kompreni, kiom longe mi dronis en kiel neimagebla profunda malĝojo? Estas feliĉe, ke mia filino trovis en la malnova loĝejo de la geonkloj rezervan retorton similan al la "lotuso" kaj tiel la simbolo de longa kaj honesta servado estas daŭrigita.



Wang Min Hao: Esperanto ŝanĝis mian vivon

Ekde ĉi-numera Mikrofone, ni malfermos rubrikon pri elstara intervjuo de nia Esperanto-elsendo. Ni elektos intervjuojn, kiuj vekis bonan reagon de niaj aŭskultantoj, kaj publikigos ilin laŭnumere en Mikrofone. Ĉi-foje ni prezentos al vi intervjuon al s-ro Wang Minhao, veterana esperantisto de Ĉinio, prezidanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio.



klarigas por aliaj partoprenantoj pri la teksto, gramatiko kaj ni ankaŭ legas. Kelkfoje, s-ro Shen Chenru, la eksa prezidanto de Esperanto-Asocio en ĉina Scienca Akademio, liveris al ni siajn materialojn Esperantajn kaj li ankaŭ legis ion en la salono kaj ni diskutis. Do, tiamaniere, ni lernas en diskutado. En la diskutado, ni ankaŭ ekzercas nin kaj altigas nian lingvan nivelon.

Mikrofone: Ĉu vi planas okazigi novan Esperanto-salonon?

Wang Minhao: Iuj niaj membroj ankaŭ deziras profunde lerni Esperanton, tamen nun estas iom malfacile por okazigi novan salonon. Ĉar mankas al ili la komuna tempo, kaj laŭ mi, ankaŭ bona lernolibro mankas. Kompreneble ĉiuj lernantoj havas siajn proprajn problemojn, ekzemple, diversajn lingvokapablecojn kaj tiel plu. Kvankam mi klopodas plialtigi lingvonivelon de ĉiuj niaj asocioj, tamen tio estas iom malfacila kaj ne povas esti rapide realigata.

Mikrofone: Vi estis elektita kiel prezidanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio pasint-aprile. Kion vi faris kaj faros por nia Esperanto-movado en via urbo?

Wang Minhao: Kiel prezidanto de nia urba Asocio, mi havas la taskon kontribui al nia Esperanto-movado. Mi planis disvastigi nian movadon en la urbo kaj la regiono. Mi deziras okazigi internacian simpozion, kongreson aŭ renkontiĝon kun alilandaj esperantistoj. Mi jam diris, ke Ŝanhajo estas internacia urbo kaj ĉiu-jare en nia urbo okazas multaj internaciaj kongresoj, simpozioj, ekspozicioj kaj pro tio multaj alilandaj esperantistoj venas. Ni ja kaptas tiun ĉi ŝancon, gastigis ilin kaj lasis al ili fari interŝanĝon kun esperantistoj en nia urbo. Do, multe kontakti kun alilandaj esperantistoj, okazigi internaciajn renkontiĝojn, estas la unua afero, kiun mi faris, faras kaj faros. Krome, mi ankaŭ klopodas altigi lingvan nivelon de niaj membroj. Ĉar tio estas la bazo de internacia renkontiĝo. Kaj ja por tio, ni ĉiu-monate unufoje okazigas Esperanto-salonon, en ĝi partoprenas preskaŭ 20 esperantistoj de nia Asocio. Kaj en tiu ĉi salono, ni informiĝas pri Esperanto-movadoj de diversaj landoj kaj ankaŭ de aliaj provincoj de nia lando. Ni ankaŭ lernas Esperantajn materialojn. En la salono, mi ĉiam

Mikrofone: Oni scias, ke nuntempe en Pekino, la Pekina Esperanto-Asocio organizas Esperanto-klubojn por infanoj en infanĝardeno. Do, ĉu vi havas planon okazigi E-klubon en infanĝardeno aŭ lernejo ankaŭ en Ŝanhajo?

Wang Minhao: Nuntempe en nia urbo, en iu mezlernejo jam ekzistas la Esperanto-klubo, ĉirkaŭ 30 gelernantoj lernas Esperanton, helpe de la membro de nia konsilantaro s-ro Xu. Laŭ mia scio, kelkaj lernantoj jam bone parolas la lingvon. Iuj el ili montras sian grandan intereson pri la lingvo. Mi intencas plialtigi ilian lingvonivelon por ke ili daŭrigu nian movadon.

Mikrofone: Antaŭ kelkaj jaroj, vi skribis artikolon, titolitan “Esperanto ŝanĝis mian vivon”. Ĉu vi povus iom rakonti al mi pri via Esperanto-vivo?

Wang Minhao: Tio estas interesa temo. Kiam mi skribis la artikolon “Esperanto ŝanĝis mian vivon”, mi prezentis ĝin al miaj amikoj eksterlandaj. Ili ankaŭ interesiĝis pri tio. Mi lernis Esperanton antaŭ 24 jaroj, tamen fakte mi sciis pri Esperanto antaŭ 40 jaroj, kiam mi estis studento de universitato. Mia fako en universitato estis rusa lingvo. Tiam mi

jam sciis, ke Esperanto estas tre bona lingvo por internacia interkomunikiĝo. En la jaro 1964 iuj miaj samklasanoj de universitato jam komencis lerni ĝin. Tamen mi regule lernis la lingvon en la jaro 1983, kiam mi partoprenis en la unu-jara kurso de Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Unufoje semajne ni havis lecionon kaj nia instruisto estis s-ino Qian Minqi kaj tiama raportistino de Radio Pekino s-ino Xu Wenqi. Ĉiuj scias, ke lernante la lingvon, oni ne nur pene studas dum lecionoj, sed ankaŭ post lecionoj. Mi estis studento de fremdlingva fakultato, do, mi bone scias kiamaniere oni povas ellerni fremdlingvon. Ja pro tio, mi mem lernis Esperanton krom kursoj. Tiamaniere post 80 horoj mi ellernis ĝin. Kaj poste, Ŝanhaja Esperanto-Asocio deziris havi min kiel sekretarion de la Asocio. Tiam mi estis instruisto de rusa lingvo en iu mezlernejo. La Asocio klopodis ŝanĝi mian laboron kaj finfine sukcesis. Do, poste mi eklaboris en la Asocio kaj samtempe laboris en Akademio de Socia Scienco, kie troviĝas preskaŭ 140 diversaj asocioj. Esperanto-Asocio estas unu el ili. Do, Esperanto ŝanĝis mian laboron kaj ŝanĝis mian vivon. Eble sen lernado de Esperanto, mi ankoraŭ estis instruisto de la rusa lingvo. En la jaro 1984, mi komencis akcepti eksterlandajn esperantistojn. Mi bone memoras, ke mia unu gasto estis japana esperantisto. Kaj poste mi akceptis grupon de esperantistoj ankaŭ el Japanio. Ĉar tiam la ĉina registaro invitis 3 000 gejunulojn de Japanio viziti nian landon, inter ili, troviĝas Esperanto-grupo, konsistanta el 50 geesperantistoj, iuj el ili nuntempe ankaŭ estas miaj amikoj. Tiam mi akompanis ilin viziti Ŝanhajon kaj libere parolis kun ili. Mi ja unufoje spertis, ke Esperanto estas tre bona lingvo por komunikiĝi kaj amikiĝi. Ja pro tio, mi pli klopode laboras por nia kara lingvo. Poste mi fariĝis sekretario de Ŝanhaja Esperanto-Asocio kaj havis multe da ŝancoj akcepti alilandajn esperantistojn ĉiu-jare. Do, mi povas multe praktiki la lingvon, kaj mia lingvonivelo pli kaj pli altiĝas. Nuntempe mi havas multajn amikojn tra la tuta mondo. Laŭ mi, naciaj lingvoj ne povas tion atingi. Pro tio, mi ege ŝatas la lingvon Esperanto. Ankaŭ iuj amikoj alilandaj demandis min, “Kial vi lernis Esperanton? Kial vi ŝatas Esperanton?” Mi ĉiam respondis, ke Esperanto estas neŭtrala lingvo, tio estas ege grava. Ĝi estas bona komunikilo inter nacioj. Ĉar se ni lernis iun nacian lingvon, ni ne povas tiel bone paroli kiel en la patrina lingvo kaj ne povas bone esprimi nian penson aŭ ideon. Nur per Esperanto, ekzistas egaleco inter ni ĉiuj esperantistoj, malgraŭ

diverseco de landoj kaj nacioj. Sur tia egaleco, ni povas plifacile interamikiĝi.

Mikrofone: Kion vi, kiel veterana esperantisto, volas diri aŭ proponi al junaj geesperantistoj?


Wang Minhao: Oni scipovas nur la lingvon, tio tute ne sufiĉas. Ĉar ni ĉiuj devas multe lerni pri la kulturo, historio, kutimoj de diversaj nacioj, kaj tiel plu. Tiamaniere, oni posedas la enhavon de parolado. Lingvo nur estas la ponto kaj ilo, kiu povas helpi vin esprimi vian penson, ideon kaj vian sciaĵon. Do, multa lernado de diversaj kampoj estas plej grava.

Mikrofone: Kiamaniere oni povas kontakti vin, se oni volas viziti Ŝanhajon?

Wang Minhao: Mia nomo aperas en la jarlibro de UEA, kaj tie troviĝas mia nomo, adreso, retadreso kaj mia telefonnumero. Kaj karaj esperantistoj, kiuj volas viziti nian urbon, unue, sendu al mi mesaĝon, kaj informu min pri via alvena dato kaj kontakta maniero. Kaj poste, ni pli detale aranĝos vian vizitadon.



Kiel prezidanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio, mi ege deziras, ke nia Asocio havu kontakton kun alilandaj esperantistoj. Oni scias, ke Ŝanhajo estas internacia urbo, kaj ĉiu-jare, multaj esperantistoj el diversaj landoj venas al nia urbo por turismo, komercado, akademia interŝanĝo ktp. Ja pro tio, mi do havas multe da ŝancoj akcepti esperantistajn amikojn. Mi varme bonvenigas vin viziti nian urbon.



Cititaj Leteroj — 海外飞鸿

Mesaĝo de eksprezidanto de UEA Renato Corsetti:

Okaze de via Printema Festo, la nova jaro de la muso mi havas la plezuron saluti vin kaj danki vin pro la laboro favora al Esperanto, kiun vi faras.

Homoj naskiĝintaj en la jaro de la muso estas optimismaj, kaj vi, karaj ĉinaj esperantistoj, rajtas esti optimismaj en ĉi tiu periodo de la jarmila historio de via lando.

La Olimpiaj Ludoj markos la progresojn de via lando, kiuj estas ĉiam pli rekonataj en ĉiuj kampoj.

Bondeziroj el Aŭstrio okaze de la Printempa Festo



Okaze de la Printempa Festo – la plej grava tradicia festo de la ĉina popolo, mi sendas al vi bondezirojn kaj samtempe kompaktan diskon de novjara koncerto, 2008, de ĉina solistino Wang Ying.

Mi jam ĝuis la solokoncerton, okazintan en la 28-a de la lasta novembro en la Ora Salonego de la Muzika Asocio en Vieno. Mi esperas, ke vi havos bonan amuzon dum la Festo, ĝuante la solokoncerton de

Wang Ying.


Iom poste nia koncerna redaktoro aranĝos programeron kun kantoj de Wang Ying por ĝuigi ankaŭ niajn aŭskultantojn. Koran dankon al amiko Patek!

Letero de Jiri Patera el Ĉeĥio:

Okaze de komenco de la nova jaro 2008 bonvolu akcepti miajn sincerajn bondezirojn pri firma sano, granda feliĉo kaj konstanta prospero kaj daŭra paco por vi ĉiuj kaj ankaŭ por viaj familianoj. Mi kredas, ke la Olimpikoj 2008 en Pekino apartenos al la plej belaj kaj la plej sukcesaj.

Viaj ĉiutagaj elsendoj en Esperanto estas tre bonaj kaj valoraj kaj mi firme deziras, ke ili daŭru ankoraŭ dum la tuta venonta jaro 2008...

Mandarenasoj en Nederlando



Antaŭ pli ol unu monato, nia nederlanda amiko Luit Staghouwer kun sia edzino biciklis al butiko. Survoje ili hazarde trovis paron da mandarenasoj en la kanalo proksima al ilia hejmo. S-ro Luit Staghouwer haste revenis hejmen por preni sian fotilon. Malgraŭ malagrabra vetero kaj

frostiga vento, li sukcesis fari kelkajn fotojn de la belaj anasoj, kiuj estas tute ordinaraj en norda Ĉinio, sed raraj en Nederlando. Ĉinoj nomas tian anason Yuanyang - 鸳鸯. 鸳 estas viranaso kaj 鸯 estas anasino. Ili ĝenerale aperas pare, vivas en nordaj regionoj de Ĉinio kaj travintras en la suda Ĉinio. Laŭ informo de Luit Staghouwer, antaŭ pli ol unu jarcento oni kunportis kelkajn tiajn ĉinajn anasojn al Nederlando por interalie plibeligi la parkajn lagetojn kaj nun mandarenasoj videblas (sed nur malofte) ankaŭ en la nederlandaj lagoj kaj riveroj kaj kelkfoje en urboj kaj vilaĝoj. Tio montras, ke la vivmedio estas tre taŭga por tiaj anasoj.

Ĉina ekspozicio en urbo Bolzano, Italio



Itala aŭskultanto Antonio Fin letere informis, ke de la 19-a de oktobro ĝis la 24-a de novembro okazis en la Multlingva Centro de la urbo Bolzano ĉina ekspozicio de ĉinaj produktaĵoj. Vizitante la ekspozicion, oni povas bone koni la historion, kulturon, kutimojn kaj morojn de Ĉinio. Li aparte menciis, ke en la Multlingva Centro funkcias ankaŭ Esperantofako, kie oni povas prunti librojn, vidbendojn kaj aliajn. Ni sendis gratulmesaĝon al la estrino de la Centro pro sukcesa okazigo de la ĉina ekspozicio

kaj funkciigo de E-fako kaj deziras al ŝi fruktodonan laboron!

Letero de Masatake Morisima el Japanio:

Mi estas 95-jaraĝa kaj tre dankas vin pro regula elsendo de Mikrofone. Estas feliĉe, ke mia maldekstra okulo ankoraŭ funkcias bone kaj per lupeo mi povas legi Mikrofone de la komenco ĝis la fino.

Poemeto de Lenke Szasz el Rumanio:

Ruĝaj beroj
Neĝkampo blankas,
Vintra vento muĝas.
Nur beroj de l' sovaĝa rozo ruĝas.
Eĉ se la vivo ŝajnas nur dezerto,
Atendas nin foj-foje belespero!

Amikeco inter esperantistoj ĉina kaj polaj



De aŭtuno 2007 ĉinino Xu Xiaonan venis al la urbo Nowy Sacz por studi en la Supera Lernejo de Negoco.

Ŝi tuj eniris al niaj koroj: Aliĝis al loka filio de Pola Esperanto-Asocio, partoprenas diversajn kunvenojn kaj aranĝojn, vizitas niajn domojn, ekamikiĝis kun niaj familianoj...

La Novan Jaron ni renkontis kune kun pli ol 200 junaj geesperantistoj el ĉirkaŭ 30 landoj!

Xiao Xiao (ni nomas ŝin tiel) estas tre simpatia, bela kaj diligenta. Ŝi iĝis nia amikino, kvankam venis el tre

malproksima lando, kaj trovis lokon en nia Esperanto-Klubo Nowy Sacz.

Halina Komar, prezidantino de PEA

Danko de Aleksandra Smulkowska el Pollando:



Mi estas via fervora aŭskultanto kaj interesiĝas pri Ĉinio, precipe pri ĉinaj metiartaĵoj. Kun danko kaj bondeziroj mi sendas al vi du fotojn montrante, kiel mi ornamis mian loĝejon per la atenteme kadritaj ĉinaj papertondajoj de diverspoza porko.

Mesaĝo de Lagutenkov Igor el Rusio:



Kun tiu letero mi sendas al vi miajn respondojn por la Konkurso de Scioj pri Pekinaj Olimpikoj kaj mi ne dubas pri la sukcesa okazigo. Mi sendas ankaŭ la foton de rusa monaĥejo en lago Seliger, kiun mi faris dum lasta vojaĝo.

Milorad Djurdjeviĉ el Serbio:

De mia bona korespondantino Szasz Lenke el Rumanio mi informiĝis, ke Ĉina Radio Internacia senpage sendas al siaj aŭskultantoj kvaronjaran revueton *Mikrofone*. Mi estis peranto de *El Popola Ĉinio* pli ol 20 jarojn kaj mi bedaŭris pro la ĉesigo de ĝia aperigo. Eble, iu inter vi ankoraŭ memoras, ke en 1987 post la UK, du EPĈ-oficistoj, tri raportistoj el la Ĉina Radio Internacia kaj la kultura ataŝejo de ĉina ambasadorejo estis miaj gastoj

en Smederevo. Mi petas vin sendi al mi eĉ malnovajn numerojn de via revueto *Mikrofone*, ĉar mi ankoraŭ estas unu inter la plej aktivaj en Esperantujo.

Norman Fleury el Kanado:

Kvankam la E-disaŭdigoj preskaŭ ĉiam estas malfacile kapteblaj ĉi tie en Montrealo, tamen troviĝas kelkcento da kurtond-aŭskultantoj, kiuj regule kaj fojefoje eĉ sukcesis en provkaptado! Eble vi povos baldaŭ plibonigi la ricevkondiĉojn, uzante re-sendilon en Eŭropo aŭ Ameriko.

Belegaj pontoj, ligantaj la popolojn de nia mondo



- Ru Bossong el Nederlando



Tra la Mondo – 世界各地

Agu por la Internacia Jaro de Lingvoj deklarita de Unuiĝintaj Nacioj por la jaro 2008-a

Okaze de la Internacia Jaro de Lingvoj, Kroata Esperanto-Ligo planas okazigi publikan prezenton de Esperanto en Urba Biblioteko en Velika Gorica, la 21-an de februaro, 2008. Pri la lingva situacio en Eŭropo al la gelernantoj parolos Zlatko Tišljar. Civitanoj de la urbo legos fragmentojn de la libro pri Zamenhof-Strato.

Esperanto-societo Senta, Serbujo, organizos esperantan renkontiĝon de la 13-a ĝis la 15-a de junio ĉi-jare sub la nomo "Verdaj amikaj tagoj". Dum staĝo oni deziras montri la lingvajn problemojn per ekspozicio de 100 nacilingvaj porinfanaj libroj. La prelego temas pri problemoj kun multnacia etoso en sia regiono, kaj eblecon kiun certigas uzo de Esperanto en internaciaj rilatoj.

La prezidanto de UEA havas revon, ke landaj asocioj faru pli da siamedia (sialanda) agado, en siaj naciaj lingvoj, kiel homoj engaĝitaj en la defendado de la lingvaj kaj kulturaj rajtoj rilate al la UN-proklamo de tiu jaro kiel Internacia Jaro de Lingvoj.

- S. Štimec

Sukcese okazis la 26-a Komuna Seminario de Ĉina, Japana kaj Korea junularoj

Laŭ raporto de SONG Ho-young, de la 28-a ĝis la 30-a de decembro, 2007, okazis en Iksan, Korea Respubliko, la 26-a Komuna Seminario de Ĉina, Japana kaj Korea junularoj. La temo de la Seminario: "La rolo

de gejunuloj por paca kunvivado inter Ĉinio, Japanio kaj Koreio". Sume 49 el 5 landoj partoprenis en la Seminario.

Informiĝinte pri la sukcesa okazigo, prezidanto de UEA sendis saluton kaj gratulon al la Seminario. Li skribis: "Tiu ĉi jam delonga brila atingo estas aparte salutinda en tiu ĉi jaro, en kiu aperis la ĉina-japana-korea komuna historio pri la moderna epoko en tre atentinda esperantiga historio por malfermi estontecon. Ni kuraĝe diru, ke la esperantistoj de la tri landoj pioniris la reciprokan komprenemon en la regiono, kiu alie tre facile povus esti unu el la mondaj krizregionoj, sed danke al tiu ĉi klopodegado ne estas tia."

Invito al la 75-a Itala Kongreso de Esperanto



Itala Esperanto-Federacio invitas vin al la 75-a Itala Kongreso de Esperanto, okazonta de la 22-a ĝis la 28-a de aŭgusto, 2008, en Grosseto, kie vi trovos esperantistojn el pluraj landoj de Eŭropo kaj eĉ pli ĉiujn organizajn kunvenojn de nia nacia movado - Eŭropan Konferencon, organizitan de EEU, tri gravajn kulturajn seminariojn kaj junularajn aranĝojn...

Mikronovelo – 微型小说

Oldulo



"Kiu?" Maljunulo ŝanceliĝe leviĝas de seĝo, iras per malfirmaj paŝoj al pordo kaj ĝin malfermas. Ĉe tiu momento frosta vento pafas neĝerojn al lia vizaĝo. Antaŭ li staras mezaĝulo, kun bovlo ĉe si.

"Zhongqing! Rapide envenu!"

"Mi alportas ĝaŭziojn."

"Ho, ne necesas!" La oldulo almontras tablon. "Rigardu! Jam 10 bovloj! Kiel mi finu ilin?" Efektive, atendas pli ol 10 bovloj da ĝaŭzioj.

"Kion fari? Tia kutimo antaŭ la novjara tago."

"Sed ĉiujare! Kiel mi danku ĉiujn kaj vin?"

"Ne diru tion, bonvole! Vi, jam tiom aĝa, ĉiam estas tiel bonkora. Kiu familio ne ricevis vian helpon?" Zhongqing akceptis tukon, etenditan de la maljunulo. "Bonvole ripozu! Morgaŭ mi revenos vin saluti en la 1-a tago de la nova jaro."

"Ne revenu! Vi havos multajn aferojn."

"Almenaŭ por iom babili. Ne akompanu! Bonan nokton!" Li paŝas eksteren kaj sin returnas. "Kiu gluis por vi la novjaran versoduon?"

"Kelkaj geknaboj el la elementa lernejo. Jam frumatene. Rigardu, ankaŭ la pentraĵojn sur la muroj. Tiom, tiom da bildoj, jam ne estas loko por ili. Fine mi diris, ke iliaj instruistoj forportu."

"Ja tiom da lernantoj, ho, kelkcent! Tutjare, venis vin ĝeni, jen tiuj, jen aliaj, por trinki teon, aŭ por ke vi riparu tablon, seĝon kaj..."

"Kaj rapide iru hejmen! Tiel froste!"

"Eniĝu! Ja tre malvarme." Zhongqing ektretis la neĝon.

Dume la oldulo ankoraŭ staras ekster la domo. Li

akompanas per rigardo la foriranton, ĝis sportoplaco de la elementa lernejo, ĝis tiu tute malaperas el lia vido.

Subite li rememoras ion kaj ekfrapas al si la faltoplenan frunton. "Kian memoron mi havas! Kial mi forgesis la kuirpotan kovrilon de Zhongqing ĝis li jus foriris!" Li riglas la pordon, paŝas al lignoamaso ĉe la lito kaj eltiras kelkajn tabulojn. Li observas tiujn pecojn sub milda lumo de elektra lampo. "Nur ĉi tiuj pecoj? Jes, nur ĉi tiuj pecoj." Li brakumas ilin kaj paŝas al laborbenko. Levinte rabotilon li komencas prilaboradon. Sed la rabotilo "malsatas". Li iom ĝin frapas per hakilo, tiel ke la klingo iom eliĝu. Li rekomencas la rabotadon. Nun la instrumento jam "ekmanĝas" la lignon. Tre bone, ritmas la sonoj, delonge al li tiom konataj, intimaj kaj dolĉaj, kvazaŭ agrablaj lirloj de monta fonto, kiuj ĉiam muzikis al li ĉe la oreloj eĉ kiam li estis kuŝanta en la lito por endormiĝo. Estas ĝuste tia muzikaĵo, kiu pli kaj pli glaceigas krudan tabulon; kaj la rabotaĵoj, ondete kaj ruliĝe emerĝantaj el inter liaj manoj, atestas, ke la longa tempo jam plugis multe da profundaj sulkoj sur lia vizaĝo.

Li ripozas. Baldaŭ li falas en dormeton, ne, fakte en rememorado. Subite novjaraj petardoj vekas lin, kaj li daŭrigas la rabotadon. Fine naskiĝas aminde ronda kovrilo. Ĝuste tiam mortas la lampo. Kion fari? Li palpas kaj palpas, kaj fine atingas kandelon. Li ĝin bruligas. Dum petolado de la kandela flameto li jen observas la potan kovrilon jen cerbumas pri io. "Al li!" Kaj li, tenante la kovrilon, paŝas eksteren, en la direkto al la hejmo de Zhongqing.

Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj	KHz
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

Konstanta adreso: Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

Tel: +86(10)68891940

Fax: +86(10)68891164

Retadreso: espradio@cri.com.cn

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renovigas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



CHINA RADIO INTERNATIONAL
中国 国际 广播电台

北京2008年奥运会持权转播商
RIGHTS HOLDING BROADCASTER OF
THE BEIJING 2008 OLYMPIC GAMES

CRI online
Esperanto

<http://esperanto.cri.cn>

(2008年第一期 总第21期)

Tel: +8610 68891940
+8610 68891916

Fakso: +8610 68891164

E-mail: espradio@cri.com.cn

Adreso: Esperanto service, CRI-36
China Radio International
P.O. Box 4216 Beijing, China 100040